



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 27-an de Marto 2023

(plifruigita de Aprilo)

Ĉeestantoj (zome): Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

La Estraro de ELI funebras la subitan forpason de nia kara amikino, Judith Epstein.

1. La 23-a Israela Kongreso – 13-a ĝis 16-a de Aprilo en Tiberiado (Amri)

a) **Amri** sukcesis rezervi unu ekstran ĉambron en la hotelo *Panorama*, entute 18; preskaŭ ĉiuj israelanoj decidis tranokti ankaŭ sabate, do 3 noktojn!

b) **Ŝlomo** jam pagis la duonon de la tuta sumo al la hotelo 3 tagojn antaŭ la evento. La ceteron ni pagos *surloke kontante*, per la mono, kiun ni kolektos, same kontante de la partoprenantoj.

c) **Mikaelo**: ni devas instrukcii la alvenantojn en la flughavenon pri la vojo ĝis la loko mem.

Jehoŝua: estas rektaj aŭtobusoj el T.A. al Tiberiado (ĉ. duhora veturado). **Amri** publikigos la informojn.

ĉ) **Amri**: pri la matenmanĝoj zorgos Avigail kaj Enrica, krom la propraj manĝoj de la kongresanoj – nia hotelo havas fridujon, kuirejon kaj manĝsalonon. La du unuaj vespermanĝoj okazos en proksima restoracio *Hermitage*, sabate – en alia restoracio, *Greta*. La interesitoj povas vidi iliajn menuojn en la Interreto.

d) **Mikaelo**: ĉu ekzistas en la hotelo la necesaj teknikaĵoj por la programeroj? **Amri** enketos ĉe la hotelo. ELI havas projekciilon, supozeble ĉe Doron – **Jehoŝua** demandos lin.

e) **Amri**: ĉeestos 14 eksterlandanoj, 11 el ili partoprenos la tutan PK.

f) **Jael Ŝelaĥ** preparos kiel ĉiam la nomŝildojn laŭ la definitiva listo far **Amri**.

2. La Dratwer-tomboj (Jehoŝua)

Amos Ŝapira informiĝos ĉe la *Ĥevra Kadiŝa* pri la tomboj de Isaj kaj Anna, kiuj ne apudas. Ni havos proponojn de du tombofaristoj.

3. Magazeno por la libroj de ELI (Ŝlomo, Jehoŝua)

Jehoŝua: Ĉu ni povus lui en la kibuco lokon por niaj libroj? **Ŝlomo** demandos post la festoj.

4. Postulo pri farmo-pago por la Dratwerejo (Jehoŝua, Ŝlomo)

Jehoŝua: informis min direktorino el la oficejo de adv. Omid (la Projekto pr Konstruo-Evakuo), ke ni devos pagi farmo-pagon (דמי-הכירה) al *Mekarkeej-Israel* 4,300 NIS ĝis iu dato. Antaŭe prizorgis ĉi tion Josi Ŝemer. **Ŝlomo** aranĝos la pagon.

5. Israela Esperantisto (Mikaelo, Amri)

Amri sendis unu artikolon al Mikaelo – pri BET sendos morgaŭ. **Mikaelo** libere enpaĝigu.

Jehoŝua ankoraŭ ne sendis la nekrologojn; do ni menciuj ĉiujn forpasintojn eĉ per simpla listo – la nekrologojn eblos publikigi en la posta numero.

La venonta kunsido: lunde, la 1-an de Majo 2023.

Protokolis: *Gabi Zeevi*